

Esperanto kaj Interlingua, 5-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 714, 1977.06.15 & 17 & 18

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. En sia ĵus aperinta verko 'Esperanto aŭ Interlingua' Edo Bernasconi demontras, ke Esperanto estas vere internacia, kontraŭe al la plimulto de siaj konkurantoj. Jen resume la argumentado:

A.- « Ekzistas en la mondo pluraj lingvoj kiel Esperanto, kie la vortradikoj neniam ŝanĝiĝas. Ili grupiĝas tutsimple laŭ la vort-enhavo, kiun oni intencas esprimi. La turka, la japana lingvoj tiurilate funkcias analoge al Esperanto. Tiujn lingvojn oni nomas aglutinaj, ĉar al la radikoj algluiĝas afiksoj kaj finaĵoj, kiuj restas senŝanĝaj. La eŭropaj lingvoj, kontraŭe, nomiĝas fleksiaj, ĉar en ili ofte modifiĝas la radikoj, afiksoj kaj finaĵoj, ili fleksiĝas. Sed kontraste kun la aglutinaj lingvoj, en Esperanto la afiksoj povas havi aŭtonoman vivon. Ezemple la afiksoj *eco, ulo, ingo, male, eta, iĝi* estas memstare uzeblaj. Tio estas karakteriza trajto de la lingvoj nomataj izolaj. La ĉina kaj la vjetnama estas izolaj lingvoj.

Cl.- Laŭ la vortaro kaj laŭ kelkaj strukturaj trajtoj Esperanto estas nepre eŭropa lingvo, sed tio estas masko, malantaŭ kiu kaŝiĝas strukturo orienta konscie elektita de Zamenhof. Tiu renkontiĝo de vortaro eŭropa kun strukturoj afro-aziaj faras de Esperanto vere internacian lingvon.

A.- Tion ĝenerale ne komprenis ĝiaj kritikintoj, kaj pro tio iliaj kritikoj estas ĝenerale tiel supraĵaj. Ili ne rimarkis, ke la kritikitaj trajtoj de Esperanto ĝuste dependas de la baza ne-eŭropa, vere internacia strukturo de Esperanto. Anstataŭ insisti pri detaloj, kiel ili faris, ili estus devintaj kritiki la esencan internaciecon de la lingvo, ĉar de ĝi rezultas fonetika grafio ne-novlatinoida, la akuzativa indikilo, ktp.

Cl.- En la adeptaro de Interlingua diversaj aŭtoritatoj estas regule citataj en la ripetata proceso kontraŭ Esperanto. Unue, la Delegacio por Akcepto de Lingvo Internacia fondita en 1901 en Parizo de la matematikisto Louis Couturat. En 1907 tiu Delegacio preferis Idon al Esperanto, sed kiu estis la aŭtoro de Idon? Couturat mem.

A.- Dua aŭtoritato kontraŭesperanta laŭdire estis Ligo de Nacioj, kiu estus rifuzinta Esperanton en 1922. La faktoj tamen instruas, ke en 1922 Ligo de Nacioj akceptis oficialan raporton pri planlingvo tre favora al Esperanto. Ĝi konsilis la tiaman Uneskon, tio estas la Komisiono pri Intelekta Kooperado, redakti pli detalan raporton. La svisa delegito Gonzague de Reynold, konata Maurras-isto, deklarita reakciulo, pliposte favoranto de la adaptiĝo de Svislando al la nova hitlera Eŭropo, profitis la okazon por verki kontraŭ-esperantan raporton. Ĝuste tiun ĉi raporton rifuzis en 1925 la Asembleo de Ligo de Nacioj, restante fidela al la akceptita favora raporto de 1922.

Cl.- Laŭ la adeptoj de Interlingua tria aŭtoritato kontraŭ-esperanta estus la organizaĵo ISO (International Standardizing Organization), kiu laŭdire iutempe akceptis Esperanton kaj poste rifuzis ĝin uzi profite al Interlingua. La fakto facile kontrolebla estas, ke tiu internacia termino-normiga organizaĵo neniam akceptis Esperanton kaj neniam Interlingua-n.

A.- La kvara aŭtoritato kontraŭ-esperanta estus la usona International Auxiliary Language Association aŭ IALA, kiun fondis kaj subvenciadis la esperantistino usona Alice Morris-Vanderbildt. Laŭ la mito IALA aŭ ties lingvistoj ellaboris Interlingua-n kiel rezulton de kvaronjarcenta laborado. La faktoj estas pli modestaj. IALA havis brilo-momenton inter 1925

kaj 1933, kiam ĝi faris esplor-laborojn. Ekde 1933 IALA perdis la kunlaboron de la esplorantoj, ĉar ĝi estis preninta la decidon krei lingvon. Dum la dua mondmilito IALA, kies sidejo troviĝis en Usono, perdis la kontakton kun la lingvistikaj granduloj. La filologo Alexander Gode profitis la okazon por evoluigi proprajn tezojn pri la estonta lingvo. Postmilito nur unu lingvisto profesia dungiĝis ĉe IALA, estis la nun famiĝinta A. Martinet. Tre rapide li demisiis, ne povante kunrespondecigi pri la aperonta lingvo. Fine tiu ĉi projekto de Gode aperis en 1951. Strange ĝi neniel profitis pri la esploroj de IALA, el la epoko kiam ĝi estis ankoraŭ forta kaj internacie organizita. Kontraŭe al la asertoj de la adeptoj de la lingvo de Gode, Interlingua ne estis verkita de lingvistoj. »

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), julio 2012*